

# Pedagogiaj modeloj por distanca lingvolernado. La kazo de Esperanto \*

(cc) Federico Gobbo

Dipartimento di Informatica e Comunicazione  
via Mazzini 5, IT-21100 Varese (Italy)  
federico.gobbo@uninsubria.it

## Resumo

La reta tekstaĵo disvastiĝas ĉiutage plej profunde, kaj tiu fakto kunportis neeviteble sian internaciigon. Konsekvence la demando pri tradukado kaj lingvaj kursoj disdoneblaj perrete pli kaj pli kreskas. Esperanto nun travivas tre interesan revigliĝon: nova generacio de parolantoj alproksimiĝis per la reta tekstaĵo kaj la aliaj retaj teknologioj: modelas la retejo *Lernu*. En la lastaj du jaroj la eksplodo de la novaj tekstoj (blogoj, vikioj, podkasto) allogis la atenton de pedagogoj kaj informadikistoj por proponi perretan lernadon en nova maniero, laŭ aliro de konstruisma metodologio, tia ke antaŭ ne longe oni parolis pri retlernado versio 2. Ĉi tiu kontribuo intencas prezenti metodologiajn kaj praktikajn sugestojn por riĉigi la ofertan panoramon pri distanca instruado de esperanto, baze de la spertaro kiun la aŭtoro maturigis en distanca lernado pri nelingvaj fakoj. Tiun spertaron oni povas fruktodone adapti.

---

\*ILEI 2006 – Diritti linguistici, insegnamento-apprendimento delle lingue ed educazione per tutti